

Enhavo

- **anoncoj**

Ankoraŭ restas tempo aliĝi al la Landa Kongreso; Novaj varoj en la retbutiko; Verkisto bezonata; Korespondi deziras; Plibonigita retbutiko; Amazon Smile

- **de la prezidanto**

- Orlando E. Raola

Estimataj geamikoj: bonvolu veni al Miamio. Bonvolu inviti vian junan Esperantan amikon aŭ amikinson. Bonvolu helpi pere de donaco por ke ni povu venigi multajn kubajn kaj aliilandajn esperantistojn al la kongreso ĉe UdeM. Bonvolu helpi organizi trajnan karavanon por veni de Norda Karolino al Miamio. Ĝis revido ĉe UdeM!

- **de la estraro**

Nova rubriko kun raportoj de la direktoroj kaj aliaj estraranoj de Esperanto-USA.

- **loke**

Ne tro el ELTRo; The Esperanto Club of North Texas; Vizito de Heidi GOES al losanĝelesa grupo

- **leterkesto**

Ĉio en la universo havas limon...

- **Brue**

senintenca esperantaĵo? - Hoss Firooznia

Ĉu ni iru al *Brue*, tiu nova kafejo apud la universitato?



Ankoraŭ restas tempo aliĝi al la Landa Kongreso

Ankoraŭ restas tempo por aliĝi al la ĉi-jara kongreso de Esperanto-USA de la 8-a ĝis la 11-a de Julio en Miamio, Florido.



Se vi ne antaŭe partoprenis kongreson, bonvolu vidi la paĝon *Introduction to the E-USA Congress* [<http://goo.gl/W08ZoS>].

Ni jam sendis aliĝilon al vi poŝte. Se vi ne ricevis ĝin, kaj vi deziras aliĝi poŝte, bonvolu telefoni al la Centra Oficejo; la numero estas (510)-653-0998.

Se vi preferas aliĝi rete, vidu la jenan paĝon pri la kongreso en nia retbutiko [<http://goo.gl/jyKXUW>].

Se vi deziras prezenti ĉe la kongreso, ni kontente aldonos vian prezentaĵon al nia programo. La longeco povas esti minimume 15-minuta kaj maksimume 45-minuta.

Por pli da informo, bonvolu kontakti min ĉe [<eusa@esperanto-usa.org>](mailto:eusa@esperanto-usa.org).

— Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo

Novaj varoj en la retbutiko

- **Three used books for \$6!**

[<http://goo.gl/nMwQIQ>]

Good condition. You will receive three used books written in Esperanto. Every attempt will be made to include books of Esperanto literature and the Esperanto language/movement. \$6.00.



- **Salutoj el 33 landoj (49-a UK)** [<http://goo.gl/Dj05sA>]

Every year the Universala Esperanto-Asocio (UEA) arranges a congress (UK) somewhere in the world. As part of the program, a representative from each country salutes (greet) the assembled participants with a short speech. For many years the speeches of the

representatives have been limited to a short phrase because of the large number of representatives (81 in 2015), but in 1964 there were only 33 countries represented at the 49th congress in the Netherlands, so each speaker was able to make a short speech. These speeches are recorded in this MP3 file. Free download.

If you are a beginning Esperantist, this recording will introduce you to the various accents of Esperanto speakers in different parts of the world. The speakers are speaking slowly and clearly, so you should be able to make out most of what they are saying (you may have to listen to the recording a few times to catch everything.)

- **Beletra Almanako 23** [<http://goo.gl/sRgE1a>]

P. DAŠGUPTO, Evgenij KREMCHUKOV, TANIKAWA Shuntaro, Ralph DUMAIN, Jouko LINDSTEDT, Gerrit BERVELING, Federico GOBBO, Aleksander KORĴENKOV, kaj aliaj. Originalaj prozo, poezio, kaj eseoj. \$17.22.

- **Beletra Almanako 24** [<http://goo.gl/WBcW0F>]

Jesper Lykke JACOBSEN, Spomenka ŠTIMEC, Mikaelo BRONŠTEJN, Sten JOHANSSON, Trevor STEELE, Ricardo CASH, Yohanes MANHITU, MAO Zifu, Galina JUZEFOVIĈ, kaj aliaj. Originalaj prozo, poezio, kaj eseoj. \$17.22.

- **La korto** [<http://goo.gl/xLlfbU>]

Kristian LUNDBERG, tradukis Gunnar GÄLLMO. Rakonto pri la junaĝo de la verkisto en la ombra parto de la socio. 146 pĝ. 2015. Svedujo. \$11.24.

- **Bukaj-aj esperantistaj frenezetuloj** [<http://goo.gl/86DgUW>]

Barry FRIEDMAN. Novelo pri esperantistoj en Ohio, USA. Elŝutebla dosiero. Senpage havebla al membroj, \$2.00 por nemembroj.

- **Vortenigmoj** [<http://goo.gl/XCPRqu>]

Makis DIRIS. 96 vortserĉ-enigmoj, kie kaŝitaj

vortoj aperas vertikale, horizontale, kaj oblikve. Solvoj aperas fine de la libro. 133 pĝ. Usono. \$15.00

- **Pondus: Maltrafoj** [<http://goo.gl/aHS9Yt>]

Frode ØVERLI, tradukis J. P. ABRAHAMSEN. La unua volumo en Esperanto de unu el la plej popularaj bildstroj en Skandinavujo. Norvegujo. Bindita. 64 pĝ. \$40.71.

Por membroj, multaj novaj varoj haveblas kun 10% da rabato. Mendu de *Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530*, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Verkisto bezonata

Mi estas iranino kaj pli ol 30-jara esperantistino, kaj mi edziniĝis kun eksterlanda esperantisto kiu malfermis Esperantan turist-agentejon en Istanbul. Kune ni multe vojaĝis kaj spertis multe da memoraĵoj. Mi ege deziras trovi kaj pagi verkiston por verki pri mia vivo ekde kiam mi eklernis nian karan lingvon. Bonvolu kontakti min ĉe <farajihelen@yahoo.com>.



Korespondi deziras

Saluton el Demokrata Respubliko Kongolando. Mi estas konga esperantisto, mia unua lingvo estas la franca, sed mi parolas ankaŭ la anglan. Miaj interesoj inkluzivas lingvojn, religiojn, turismon ktp. Mi estas fraŭlo. Multe plaĉus al mi trovi amikino/amikon samsekseman ĉar mi mem estas samseksema.

Jean ESPE, <jean.esperantujo@gmail.com>



Plibonigita retbutiko

La retbutiko de E-USA havas kelkajn plibonigojn.

- Oni povas nun butikumi en Esperanto aŭ en la angla. En la supra dekstra angulo de la paĝoj estas du flagoj, kiuj reprezentas la lingvojn.



Alklaku flagon por montri preskaŭ ĉion en la elektita lingvo. Mi diras “preskaŭ ĉion”, ĉar multaj priskriboj de varoj atendas tradukon.

- Oni nun povas ricevi anoncojn pri novaj varoj en la retbutiko (inkluzive de brokantaĵoj). Unufoje semajne, novaj varoj estas anoncigitaj. Oni povas ricevi anoncojn per retpoŝto aŭ per Twitter. Por pli da informo, vidu la ĉefpaĝon de la retbutiko [<http://esperanto-usa.org/retbutiko/>].



There have been several improvements to E-USA's online store.

- You can now shop in English or in Esperanto. In the upper right-hand corner of every page you will see two flags, representing the languages. Click on the language you prefer.
- You can now receive announcements of all new and used products when they are added to the store. For more information, see the store's homepage [<http://esperanto-usa.org/retbutiko/>].

— Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo

Amazon Smile

Se vi aĉetas varojn de Amazon, mi kuraĝigas vin aliĝi al AmazonSmile [<https://smile.amazon.com/>] kaj fari kontribuojn al Esperanto-USA senpage.



Por aliĝi, sekvu la supran ligilon kaj kaj ensalutu per via Amazona pasvorto. Elektu *Esperanto League for North America, Inc.* kiel vian almozfondaĵon (“Esperanto League for North America, Inc.” estas nia laŭleĝa nomo.)

Post tiam, ĉiufoje kiam vi aĉetos ion ajn ĉe Amazon, la firmao aŭtomate kontribuos al Esperanto-USA.



If you purchase items from Amazon, I encourage you to sign up for AmazonSmile [<https://smile.amazon.com/>] and make donations to Esperanto-USA without any cost to you.

To sign-up, follow the above link and log in with your Amazon password. Select *Esperanto League for North America, Inc.* as your charity (“Esperanto League for North America, Inc.” is our legal name.)

Thereafter, every time you buy something from Amazon, the company will automatically make a contribution to Esperanto-USA.

— Vilĉjo HARRIS, *Direktoro de la Centra Oficejo*

senintenca esperantaĵo?

Brue

Hoss FIROOZANIA



“Hej, mi volas eksidi ie kaj paroli kun vi pri via vojaĝo. Ĉu ni iru al *Brue*, tiu nova kafejo apud la universitato?”

“Nu, eble ni kafumu aliloke. Estas kutime tro brue ĉe *Brue*.”

de la prezidanto

Orlando E. RAOLA

En Julio komenciĝos en Universitato de Miamio, Florido, la 64-a Landa Kongreso de Esperanto en Usono, organizita de Esperanto-USA, via landa asocio, kaj de grupo de esperantistoj en suda Florido, kune gvidata de Rob KVAŠŇÁK kaj Dennis KEEFE.

La estontaj historiistoj de la Esperanto-movado en nia lando havos sufiĉe riĉan materialon por esplori kaj prikomenti rilate la okazigon de tiu ĉi kongreso en Miamio. Ekde la plej fruaj tempoj, kiam ni ekpensis pri venigo de nia plej grava ĉiujara renkontiĝo al la bela kaj sunplena urbo en la sudorienta angulo de la lando, ni tuj aŭdis pri kiel malfacile estos tion fari: la loka grupo estas malgranda kaj malforta, la situacio de publika transporto en la regiono estas terura, mankas al ni kontaktoj ĉe la eblaj lokaj kongresejoj...

Membroj de aliaj grupoj malpli obstinaj ol ni, esperantistoj, tutcerte estus rifuzintaj akcepti la defiojn, kaj estus trovintaj rapide alian lokon por la jara festivalo. Sed ni ja insistis. Survoje al Havano pro familia vizito, mi uzis tutan tagon por kunsidi kun la esperantistoj en Miamio, kaj por viziti la Universitaton de Miamio (UdeM), kiun ili trovis taŭga por gastigi la kongreson. En tiu momento ni havis la planon kunokazigi NASK-on en la sama loko, kaj ni ankaŭ kalkulis je favora sinteno antaŭe esprimita de ESF, la organizantoj de NASK, rilate okazigon de la kursaro en tiu regiono de la lando.

Bedaŭrinde, iom burokrateca malhelpeto simple frakasis niajn revojn kaj planojn. Por rajtigi nin uzi la universitaton kiel kongresejon, UdeM postulas havi sponsoron inter la profesoroj de tiu institucio. Simpla formalajo, laŭ la klarigoj de la respondeculo pri loĝadoj kaj konferencoj. Mi kompreneble turnis min al la estro de la lingva fako en la universitato kaj sendis al ŝi longan klarigon pri niaj celoj, kaj pri la naturo de la grupo kiu planis viziti la lokon kaj tiel plu. Mi vane atendis respondon dum pluraj monatoj. Intertempe, la administrantoj de ESF petis de ni precizigon pri la kongresaj datoj, kiun ili bezonis por decidi pri la datoj de la kursoj. Sed la manko de sponsoro (fakte mi petis sponsoradon por ambaŭ eventoj – NASK kaj la landa kongreso), decidigis ilin finfine reveni al la universitato William

Peace en Norda Karolino.

Preskaŭ senespere, mi petis al niaj lokanoj denove viziti la lokon, sed ili ne sukcesis ricevi inviton por intervjuo. Mi resendis retmesaĝojn plurfoje, klopodante premi sufiĉe forte, sed daŭre resti ene de la limoj de civilizita kaj respektema dialogo, kaj tio estis ja malfacile... Mi petis al mia fratino, kiu loĝas iom proksime de UdeM renkonti la celatan profesorinon persone, kaj finfine je la tago kiam mia fratino estis jam survoje al UdeM, mi ricevis belan kaj pozitivan mesaĝon de la estrino de la lingva fako. Ŝi konfirmis ke ŝi kompreneble sponsoros nian kongreson, ke ni povos uzi plurajn rimedojn por reklami ĝin, ke estus bonvene okazigi aranĝon kun partopreno de la loka komunumo, ktp. Nu, iom malfrue (ŝi senkulpigis sin pro troa profesia okupiteco) sed ni havis kongresejon!


Nia oficeja direktoro Vilĉjo HARRIS finpretigis la aliĝilon, kiu estis dissendita al ĉiuj asocioj kaj nun ni eniras la plej gravan parton de la kongresa organizado: sukcesigi multnombran aliĝon al la kongreso. Pro kaŭzoj kiujn mi ne emas denove rakonti, vi eble scias, ke nia kongreso pasintjara en Detrojto estis unu el la plej malgrandaj (mi ja ne kontrolis, sed mi esperas, ke ne temas pri la plej malgranda) en nia historio. Ni forviŝu la malkonvenan bildon de malforta asocio organizinta magran kongreseton pere de abundo de membroj, el ĉiuj ŝtatoj kaj regionoj de la lando kie ekzistas organizita movado, plus jen kaj jen izolitaj membroj kiuj emus partopreni plus niaj nordaj kaj sudaj najbaroj, kiuj ĉiam estas bonvenaj al nia kongreso.

Parolante pri sudaj najbaroj, mi ne povas eviti la emon rakonti pri la nunaj novaĵoj rilate al Kubo. Vizito de prezidento Obama lastatempe okazis, la normaligo de rilatoj inter la du landoj malrapide sed tute rimarkeble progresas. La alia vizito, tiu de deko da usonaj esperantistoj al la landa kongreso en Kubo pasintan Novembron, nun povas esti reciprokata de kubaj esperantistoj, kaj ili eventuale ankaŭ sukcesos partopreni NASK-on. Mi esperas, ke unu el la pintoj de la kongreso ĉe UdeM estu la monda premiero de la filmo, kiun okaze de la nia vizito al Kubo kaj kun aŭspicio de Esperanto-USA kreis la brazila filmisto-ĵurnalisto Fabjo MONTEIRO.

En Miamio ni dediĉos iom da tempo al kuna diskutado de la rekandidatiĝo de Montrealo por esti la gastiganto de la Universala Kongreso de Esperanto en 2019. Denove la invito okazos kiel kuna agado de la landaj asocioj kanada kaj usona, kune kun la provinca kebekia Esperanto-organizaĵo. Ĉiuj diras, ke la ŝancoj havi la sidejon kiam oni petas la duan fojon estas multe pli grandaj (ja Seŭlo por la venonta jaro devis peti dufoje por finfine ricevi ĝin). UEA decidis pri la kongreso 2019 ne ĉi-jare en Nitro sed venontjare en Seŭlo, kaj se ni profitas tutan jaron por kunorganizi nian agadon kaj pretigi la plej elstaran pakaĵon iam ajn prezentitan, ni certe estos sur bona vojo.

Estimataj geamikoj: bonvolu veni al Miamio. Bonvolu inviti vian junan Esperantan amikon aŭ amikinin. Bonvolu helpi pere de donaco al fonduso

Amikeco Translimen por ke ni povu venigi multajn kubajn kaj alilandajn esperantistojn al la kongreso ĉe UdeM. Bonvolu helpi organizi trajnan karavanon por veni de Norda Karolino al Miamio (72 dolarojn kaj 20 horojn per trajno *Silver Star*, aĉetu vian bileton frue (Ĉar poste estos pli multekoste kaj eĉ elĉerpiĝos frue!) Ĝis revido ĉe UdeM!



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

Ieterkesto

Ĉio en la universo havas limon...

En numero 2016:1 aperis artikolo de Vilĉjo HARRIS titolita *How to acquire Esperanto*. Li skribis:

As an adult student of Esperanto, you can acquire the language while you are learning it. The trick is to find interesting reading and listening materials and enjoy them. The amount of reading material for beginners is limited, and the amount of listening material for beginners is even more limited.

Asertoj tiaj ne helpas la disvastigadon de Esperanto. Ĉio en la universo havas limon... eĉ la nombro de steloj en la ĉielo.

Sed en Interreto ni havas sufiĉe da materialoj por lerni kaj praktiki Esperanton. Vidu ekzemple:

- <http://esperantofre.com/faktoj/>

[<http://esperantofre.com/faktoj/>]

- <http://esperantofre.com/edu/libroja.htm>
[<http://esperantofre.com/edu/libroja.htm>]

Bonvolu trairi la tutajn retpaĝojn por vidi, kiaj informoj estas en ĝi. Ambaŭ retpaĝoj havas tri versiojn: esperantan, anglan, kaj hispanan.

— *Enrique ELLEMBERG*

Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



de la estraro

Jam de jaroj nia bulteno havas rubrikojn por funkciuloj de Esperanto-USA: ekzemple la Prezidanto (“*de la prezidanto*”), la Direktoro de la CO (“*el la Centra Oficejo*”), kaj eĉ mi (“*de la redaktista skribotablo*”). Ĝis nun, tamen, mankis dediĉita spaco por la aliaj membroj de la estraro. Do jen provo kompensi tiun mankon.

Ĉiunumere mi petos la estraranojn iomete verki por sciigi al vi, kion ili lastatempe faris. Sed ili mem decidu pri kiel plej konvene utiligi la spacon: ĉu raporti pri agadoj, ĉu proponi aŭ diskuti ideojn, ĉu instigi membrojn al kunlaboro en diversaj projektoj, ktp. Ĉiukaze mi esperas, ke vi trovos la enhavon kaj informa kaj interesa.

Kaj ne forgesu: mi volas aŭdi ankaŭ *viajn* demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro — ĉu en Esperanto aŭ en la angla. Ne hezitu utiligi la leterkeston, kie viaj pensoj estas ĉiam bonvenaj!

— *La redaktoro*

Julie SPICKLER, Vicprezidanto

Dum jaroj mi partoprenis la Esperantan kursaron ĉe la universitato Stanford, gviditan de Ed (“Trio”) WILLIGER, nia nuna UEA-Ĉefdelegito. En tiu ĉi akademia jaro, kiu komenciĝis en Oktobro, la kurso estis tre sukcesa kaj plena de junuloj (kaj ne-junuloj) kiuj volas lerni aŭ plibonigi sian region de Esperanto.


Trio gvidis tiun kurson dum pli ol 25 jaroj, kaj diris, ke ĉi tiu estas la fina jaro por li. Dum Aprilo li vojaĝos en Eŭropo, kaj petis, ke mi kaj aliaj “veteranoj” de la kurso gvidu ĝin dum la printempa kursperiodo. Do mi faros, helpota de Bob RUSSELL.

Krom tio, mi ankaŭ prezentis raportojn ĉe la monataj kunvenoj de SFERO, nia loka grupo, pri miaj spertoj kiel membro de la “Kuba Karavano”, grupo de eksterlandanoj de Usono kaj Eŭropo kiuj ĉeestis la LK-on de la Kuba Esperanta Asocio en Novembro.



Jessica GRASSO, Direktoro

Saluton! Mia nomo estas Jessica GRASSO kaj mi estis denove elektita kiel estrarano de E-USA. Bedaŭrinde, iel okazis (denove!) fuŝo dum la kreado de la balotiloj, kaj rezulte malaktualaj informoj aperis pri mi. Vi ne vidis min dum la someraj renkontiĝoj, fakte, dum kelkaj jaroj mi ne plu loĝas en Usono, kaj ĉi-somere denove ne povos viziti la landon aŭ ĝiajn Esperanto-renkontiĝojn. Tamen, mi restas aktiva en mia nova hejmurbo kaj kontribuas al diversaj projektoj per Interreto. Por E-USA, mi same estos virtuala estrarano, kaj ĉefe ŝatus helpi renovigi la retpaĝojn, laboron kiun ni jam komencis sed intertempe ne multe progresis. Mi ankaŭ povas doni konsilojn kaj spertojn pri Esperanto-eventoj ĝenerale, ĉar mi jam partoprenis diversajn renkontiĝojn en kelkaj landoj kaj ankaŭ mem organizis malgrandajn lokajn eventojn.



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- George BAKER, Kasisto
- Jarlo BILLS, Direktoro
- Charlotte BURTON, Direktoro
- Elizabeto DORCAS, Direktoro
- Taylor FRANCIS, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro
- Chris NELSON, Sekretario
- Kelly NETTERVILLE, Direktoro
- Andrew ROSENBAUM, Direktoro

Ne tro el ELTRo

En tiu ĉi jaro la Esperanto-Ligo de la Toleda Regiono (ELTR-o) aligis du novajn membrojn. Nia malgranda grupo nun havas sep anojn. Ni kunvenas du fofojn ĉiumonate. Pasintan someron Jack GOODHAND (“Johano Bonamano”), kiu estas esperantisto de pli ol dudek kvin jaroj, vizitis la Universalan Kongreson en Lille, Francujo. Li montris al ni multajn fotojn de la evento. En Aprilo ni partoprenis la Internacian Festivalon de la ĝemelurba organizo *Toledo Sister Cities*. Mallongan kurson pri Esperanto prezentis Jasmine TOWNSEND, kaj ELTR-o havas tablon tie por informi pri la internacia lingvo. En Junio, Warren Hunt vizitos Herzberg am Harz, la “Esperanto-Urbo” de Germanujo.

The Esperanto Club of North Texas

The Esperanto Club of North Texas is an informal club that meets in the Dallas-Fort Worth area. We typically have ten to twenty participants in our meetings. We have a website and a mailing list for conversations between meetings.



A meeting of the North Texas group. Photo by Elizabeth Dorcas.

The club began regular meetings in 1992. After attending the *Universala Kongreso* in Warsaw in 1987, and having a friend from Koszalin, Poland visit north Texas in 1991, I felt we needed to have a club in North Texas. After calling many people in the ELNA membership list, Roy Crochet, Barry Friedman and I began to meet irregularly every

month or two. After some time we decided we needed to advertise. The three of us got together with Jarlo Bills at SMU where Barry worked, pooled some money and placed an advertisement. In response to the ad, we had our first meeting at the home of Joe and Anna Burba. At that meeting we decided to hold our meetings monthly. We met at the Burba’s home for many wonderful years.

By calling the club “informal,” I mean that we do not have a regular set of officers. Our sole officer is our Treasurer who tends to our money when we have some. Jarlo fills this role. Otherwise when a task needs doing, we find someone willing to lead that task. So Phil Dorcas sends out meeting announcements, and Ron Wolf tends to the website. When we sing, Jarlo and Rhanda Hasley play and lead the music. I try to get members to talk about some topic. Our rule is that we may talk in English if the topic is Esperanto. For other topics, we talk in Esperanto. This rule is suspended when we have beginners come to one of our meetings.

I bring an agenda to our meetings so we can do things in a regular order. The usual order at club meetings is to greet one another, chat about some topic, go around the table discussing what we have done for/in Esperanto in the last month, plan for upcoming events, and finally play a board game to help us learn vocabulary. The games are good for younger members and enjoyed by everyone.

In the past we have had three gatherings a month: two conversational circles and one regular club meeting. We have had only the regular club meeting for the past several months for lack of meeting places for conversational circles. Conversational circles are small group meetings where we discuss events in Esperanto and play vocabulary-building board games. Conversational circles need relatively quiet, public meeting places.

Member retention is our largest problem. We greet new members enthusiastically and speak in both English and Esperanto so they can hear the language and still remain comfortable. We try to connect them with Esperanto learning resources. We get their contact information and try to follow up with a welcoming email during the first week

after the meeting. Still, our long-term membership grows slowly.

— *Fred MEYER, III*

Vizito de Heidi GOES al losanĝelesa grupo

La unuan fojon vizitis mi fama esperantist(in)o! La 27-an de Marto venis al Losanĝeleso Heidi GOES [*hejdi ĥus*], iama sekretario de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA), instruisto de nia lingvo en Indonezio kaj Orienta Timoro, esploristo de iuj diversaj dialektoj en Angolo, kaj lingvisto pri la regiono inter Gabono kaj Angolo.



Grifido, Helen; parolas Heidi. Foto de Karlo EZEBINGAYA.

Eble vi pensas, leganto, ke okazis serioza, senrida, sed bona tago. Jes ja pri bona tago.

Heidi estas tre aktiva, facile ridetas, ridas, kaj amas veganan nutraĵon. Pro tio, ses esperantistoj bankedis vegane. Oni povas revii pri tia konversacio.

Post tio Heidi montris al ni ciferecajn fotojn pri siaj spertoj, esploroj en Angolo, inkluzive de mapoj pri la miksaj dialektoj, kiujn ŝi treege zorge studas — celanta disertacion por doktoriĝi, pere de aparta fakto en sia universitato en Gent, Belgujo. Heidi serĉas tempon por fini naŭ-jaran projekton, iel subtenatan de ESF: libron pri la historio de Esperanto en Indonezio.

Tiu nia brila, tiel afabla, ege bonkora gasto estas belgo el Bruĝo (Brugge).

Ĉu vi, leganto, nun imagas ke tio ĉi sufiĉos, kiam vi, esperas la skribanto, renkontos nian Heidi GOES?

— *Keneĉjo GOLDBERGO*

Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.